**KISS János** (1857-1930) filozofo, universitata profesoro, eklezia verkisto, Eisto. Kristana Filozofia Katedrestro de Pázmány Péter Tudományegyetem 1914-1928, komitatano, poste honora membro de Hungarlanda Esperanto-Societo.

**Budapest VIII.** (Józsefváros), tombejo Kerepesi 56-1-30, (ĉe la tombejo juda, kontraŭ la tomboj de la ordeno karmmontanoj. **Tombmonumento. Orbán Antal** skulptartisto. – La tombo estas malzorgata, fiherboj kovras ĝin, trovi estas malfacile.

**KORACH Mór** (1888-1975) Kemikisto, ceramikisto, membro de Hungara Scienca Akademio. Eisto de 1912, pioniro de scienc-teknika aplikado de Esperanto, honora membro de Hungara Esperanto-Asocio (1966-1975).

**Budapest VIII.** (Józsefváros), tombejo Kerepesi, 34/2-1-29

☞ [http://www.agt.bme.hu/staff\\_h/varga/foto/kerepesi/korach.html](http://www.agt.bme.hu/staff_h/varga/foto/kerepesi/korach.html)

**Várpalota**, Thury-fortikaĵo, Hungara Kemio-Muzeo. Réz **Duonreliefo** el kupro, mezuro: 715x830x105 mm. **1988. Orr Lajos.** Originale en Veszprém, en la strato kun lia nomo, super la stratnomtabulo. Starigis Konsilantaro de la urbo Veszprém, je 100-a datreveno de lia naskiĝo. La antaŭa nomo de tiu strato estis Hóvirág, en 1991 ricevis sian originalan nomon, kaj la duonreliefon oni metis en muzeon. Surskribo: [KORACH MÓR / 1888-1975 / VEGYÉSZMÉRNÖK / AZ MTA RENDES TAGJA / A VESZPRÉMI / MŰSZAKI KUTATÓIN- / TÉZET KOSSUTH-DÍJAS / IGAZGATÓJA / SZÜLETÉSÉNEK / 100. /](#)



**ÉVFOR- / DULOJÁ / RA / ÁLLÍTOTTA / VESZPRÉM VÁROS / TANÁCSA** (Mór Korach kemia inĝeniero, membro de HSA, Kossuth-premiita direktoro de la Teknika Esplorinstituto en Veszprém, je centa datreveno starigis Konsilantaro de Veszprém)

☞ Próder István

**KOSSA István** (1904-1965) grupestro de la tramista sindikato kaj Esperanto-grupestro, tial li estis devis militservi en pun-kompanio. Tra la frontlinio li sukcese fuĝis al la rusoj, poste iĝis komunista politikisto. Ĉefsekretario de la Sindikata Konsilio, deputito de la departemento Veszprém. Prezidanto de Hungaria Esperantista Societo Laborista (1945-1949), protektanto de Hungarlanda Esperanto-Societo (1949-1950), kiel minsitro pri trafik- kaj poŝtaferoj apoganto de Fervojistaj Fakoj de Hungara Esperanto-Asocio (1960-1965), prezidanto de la unuan fojone en Hungario aranĝita IFEF-kongreso.

**Budapest VIII.** (Józsefváros), tombejo Kerepesi, maldekstra laboristmovada promenejo, **ornamtombo.**

**Pápa.** Str. Kossa István nr. 2. Marmora **memortabulo.** 1979-03-30. Surskribo: **KOSSA ISTVÁN / 1904-1965 / A MAGYAR MUNKÁSMOZGALOM KIEMELKEDŐ SZEMÉLYISÉGE / VESZPRÉM MEGYE ÉS VÁROSUNK ORSZÁGGYŰLÉSI KÉPVISELŐJE EMLÉKÉRE, SZÜLETÉSÉNEK 75. ÉVFORDULÓJA ALKALMÁBÓL. / PÁPA, 1979. MÁRCIUS 31. / MSZMP VÁROSI BIZOTTSÁGA, VÁROSI TANÁCS** (István Kossa 1904-1965, elstarulo de la hungara laborista movado, deputito de la departemento Veszprém kaj nia urbo, je lia memoro okaze de lia 75. naskiĝdatreveno. Pápa, 1979-03-31.) Nun en nekonata loko. >> ☞ Bándi László 105

**Pula,** Fő u. 31. Marmora **memortabulo.** 1965-11-05. Stumpf János ŝtontajlisto. Surskribo: **KÖZSÉGÜNK NAGY BARÁTJA / KOSSA ISTVÁN / 1904-1965 / EMLÉKÉRE** (Je la memoro de la granda amiko de nia vilaĝo. >> ☞ Bándi László 116

**Tapolca,** Antaŭ la ĉefpoŝtejo. Bronza **portreto.** 1982. Marton László skulptartisto. >> KIL M/XV.

**Veszprém.** En la vestiblo (en la iama str. Shönherz Zoltán) de la Centra (iama Kossa István) Kolegio de Kemiindustria Universitato de Veszprém marmora **memortabulo** kun bronza lameno. Sulptartistoj Götz János kaj Márton István. Surskribo: **KOSSA ISTVÁN 1969-04-19,** dum la universitataj tagoj festantaj la 20-an datrevenon de la fondo de la univarsitato, je la ĉeesto de la familianoj Kossa, kun memorparolado de profesoro Ernő Nemez. **Götz János** skulptartisto, la ornamkovraĵon en la fono planis **Márton István** konstruĝinĝeniero. Kossa paroladis la 22-an de oktobro 1949, dum la fondfestado de la Universitato Kemiindustria en Veszprém. La studenthotelo en 1968 ricevis la rangon kolegio kaj la nomon Kossa István "...kiel signo de dankemo al tiu deputito, kiu grave kontribuis al la lokigo de la universitato al Veszprém, kaj kiu ĝis sia morto en 1965 helpis solvi la problemojn" – skribis poste la jarlibro eldonita je la 25. datreveno de la Kemiindustria Universitato en Veszprém. En la komenco de la naŭdekaj jaroj, je la nomŝanĝo de la kolegio, laŭ buŝa ordono de la rektoro oni haste forigis la memortabulon kune kun la ornamkovraĵo. Ĝia plua sorto estas nekonata. >> Leleplezték Kossa István emléktábláját. = *Egyetemünk.* (Veszprém) 1969-05-03. p.2. – ☞ Bándi László 173

**KOSZTOLÁNYI Dezső** (1895-1936) hungara poeto, verkisto, ĵurnalista. Li ellernis Esperanton en 1905. Vicprezidanto de Propaganda Komitato de Internacia Lingvo (1918-1922).

**Budapest I.** Str. Logodi nr. 1. (str. Tábor nr. 12.) Tie li loĝis, envere iom pli norde, laŭ lia poŝtadreso str. Tábor nr. 12, ja la domo estis en la finiĝo de ambaŭ stratoj. **Bronreliefa memortabulo.** 1990. Teksto: „**A HÁZ IS ALSZIK HOLTAN ÉS BUTÁN / MINT MAJD SZÁZ ÉV UTÁN, / HA ÖSSZEOMLIK, GYOM VIRÍT ALÓLA / HOGY OTTHONUNK VOLT-E VAGY ÁLLAT ÓLA**” / **EGYKORI HÁZÁBAN ITT ÉLT ÉS ALKOTOTT / KOSZTOLÁNYI DEZSŐ / KÖLTŐ / BUDAPEST FŐVÁROS TANÁCSA / I. KERÜLETI**

**TANÁCS.** („Ankaŭ la domo dormas morte kaj stulte / kiel iam post cent jaroj, / se ruiniĝos, trudherbo floros de sub ĝi / ĝi estis ĉu hejmo ĉu bestejo” / en sia iama domo tie vivis kaj kreis Dezső Kosztolányi / poeto / Konsilantaro de Ĉefurbo Budapeŝt / Konsilantaro de la distrikto I.) Czinder Antal skulptisto.

[http://hu.wikipedia.org/w/index.php?title=F%C3%A1jl:Kosztolanyi\\_Dezs%C5%91\\_eml%C3%A9kt%C3%A1bla\\_Budapest\\_T%C3%A1bor\\_utca.JPG&filetimestamp=20090321172234](http://hu.wikipedia.org/w/index.php?title=F%C3%A1jl:Kosztolanyi_Dezs%C5%91_eml%C3%A9kt%C3%A1bla_Budapest_T%C3%A1bor_utca.JPG&filetimestamp=20090321172234)

**Budapeŝt IX.** (Ferencváros) vojo Üllői nr. 21. **Memoro kun bronza reliefo.** 1989. Borbás Tibor skulptisto.

**Budapeŝt XI.** (Újbuda). Parko en Kosztolányi Dezső tér. **Bronza busto.** 80 cm, kun la postamento 170 cm. Apud la kubutuma figuro libro. 1979. Borbás Tibor skulptisto.

**Subotica / Szabadka SR,** en la parko apud Gimnazio Svetozar Marković. **Statuo.** 1985. Almási Gábor skulptisto en Subotica / Szabadka.

**Subotica / Szabadka SR,** sur la muro de Gimnazio Svetozar Marković trilingva **memortabulo kun bronza portreto.** 1993. Almási Gábor skulptisto en Subotica / Szabadka. Teksto serbe, hungare, kaj kroate: KOSZTOLÁNYI DEZSŐ / 1885-1936 / У СУБОТИЦИ СЕ РОДИО, У СВОЈ ЗГРАДИ ЈЕ / СТАНОВАДО И ПОХАЋАО ГИМНАЗИЈУ ЗНАМЕНИТИ / МАЂАРСКИ КНИЖЗЕВНИК ЕВРОПСКОГ ГЛАСА / ДЕЖЕ КОСТОЛАЊИ. / SZABADKÁN SZÜLETETT, EBEN AZ ÉPÜLETBEN LAKOTT ÉS VÉGEZTE GIMNÁZIUMI TANULMÁNYAIT / A XX. SZÁZADI MAGYAR IRODALOM / EURÓPAI RANGÚ ÍRÓJA. / DEZSŐ KOSZTOLÁNYI MAĐARSKI KNJIŽEVNIK / EUROPSKOG GLASA RODIO SE U SUBOTICI, / STANOVAO JE I GIMNAZIJU POHADAŌ / U OVOJ ZGRADI. / SUBOTICA 1993 // ГРАДИКИ СУБОТИЦЕ / VÁROS POLGÁRAI / GRADINI SUBOTICE. (Dezső Kosztolányi 1885-1936, naskiĝis en la urbo Subotica, en tiu domo loĝis kaj studis en gimnazio, Eŭrop-dimansia verkisto de la 20-jarcenta hungara literaturo.)

**KÖKÉNY Lajos** (1897-1985) instruisto, stenografo. Fondinto kaj redaktoro de *Hungara Heroldo* kaj *Hungara Esperantisto*, pluraj libroj, jarlibroj, gvidlibroj kaj *Enciklopedio de Esperanto* (1934), movadhistoriisto. Elstara movada gvidanto, Hungarlanda Esperanto-Societo: prezidanto (1941-1947), kunprezidanto (1947-1947-1949) dum la plej malfacilaj jaroj, honora prezidanto de 1977. Universala Esperanto-Societo: honora membro de 1980.

**Pécs** Esperanto-parko, en la str. Papnövelde. **Memortabulo.** Teksto: **KÖKÉNY LAJOS / 1897-1985 / folyóirat- és lexikonszerkesztő / mozgalmi vezető / redaktoro de revuo kaj enciklopedio, movadestro / MESZ – EKF Pécs 2010 – DURA** Dum la inaŭguro 2010-05-24 salutparolis Imre Szabó, Prezidanto de HEA. **G. Nagy Róbert.**

**Budapeŝt VIII.** Új Köztemető 16/IX-2-10 **síremlék**

**KULICH Gyula** (1914-1944) tajlorlaboristo, organizanto de kontraŭfaŝisma agado de Landa Junulara Komitato (de Socialdemokrata Partio), martiro de laborista movado murdita en Dachau. Li lernis Esperanton en siaj studentaj jaroj en la grupo Békéscsaba de Hungarlanda Esperanto-Societo, poste membriĝis en la grupo XIX. De Hungaria Esperantista Societo Laborista.

**Békéscsaba,** Munkácsy tér (iama Kulich Gyula tér). 1975. Bronzlamena Kulich Gyula **monumento** Kulich Gyula. **Varga Imre** skulptartisto. Surskribo: **KULICH GYULA / 1914-1944 / „Olykor éltam én e földön, / mikor az ember úgy elaljasult, / hogy önként, kéjjel ölt...” (Radnóti Miklós).** („Mi vivis sur la Tero kiam la homo kanajliĝis murdante memvole, volupte...” Miklós Radnóti) – Aŭtonomio de la urbo Békéscsaba 1991-05-23 decidis „La monumento restos sen nomo kaj numero” kaj lia nomo estos **Martír-monumento.** >> 132/1991. (V.23.) közgy. 1/a.

**Békéscsaba**, Muzeo, str. Fábry. Pli frue en la bazlernejo Kulich Gyula, 1981. Bronza [statuo](#).  
**Udvardy Anikó**.

**Békéscsaba**, Muzeo, str. Fábry. Pli frue en la str. Baross, sur la muro de Lernejo de Industria Faklaboristoj nr. 635. sz. [Memortabulo](#). Teksto: **EBBEN AZ ISKOLÁBAN TANULT 1929-1931 ÉVEKBEN A MAGYAR MUNKÁSMOZGALOM MÁRTÍRJA / KULICH GYULA / HARCOS, HŐSI ÉLETE LEGYEN PÉLDAKÉP. AZ ESZME, AMELYÉRT MEGHALT GYŐZEDELMESEKEDETT.** (En tiu lernejo lernis en la jaroj 1929-1931 martiro de la hungara laborista movado Gyula Kulich batalanto, lia vivo estu modelo.) – Aŭtonomio de la urbo Békéscsaba 1991-05-23 decidis pri ĉesigo de tiu memorloko. >> 132/1991. (V.23.) közgy. 1/d.

**Budapest VIII.** (Józsefváros), Kálvária tér (1957-1991 Kulich Gyula tér) nr. 13. Bronza [memortabulo](#) inaŭgurita en 1957 aŭ pli frue. Ĝia teksto laŭ informo de la urbestra oficejo: **KULICH GYULA TÉR / KULICH GYULA (1914-1945) / BÉKÉSCSABÁN SZÜLETETT / AZ ORSZÁGOS IFJÚSÁGI BIZOTTSÁG TITKÁRA / A MAGYAR KOMMUNISTA IFJÚSÁGI MOZGALOM / EGYIK BÁTOR VEZETŐJE VOLT / A HITLERI FASISZTÁK 1945 JANUÁRJÁBAN KIVÉGEZTÉK** La sorto de la memortabulo estas nekonata, verŝajne oni ŝtelis ĝin ĉ. 1990-1991. > Fővárosi Tanács VB 604/1957.sz.

**Budapest VIII.** (Józsefváros), Kálvária tér (1957-1991 Kulich Gyula tér). [Bronza portreto](#). 1958. **Kelemen Kristóf** skulptartisto. La sorto de la portreto estas nekonata, verŝajne oni ŝtelis ĝin ĉ. 1990-1991, nur la postamento estas en la angulo de la placo.

**Budapest VIII.** (Józsefváros), Rákóczi tér nr. 4., Vestajindustria Fakmezlernejo kaj Gimnazio Jelky András (ĝis 1993 Vestajindustria Fakmezlernejo Kulich Gyula). [Portreto](#) el kalko 1961. **Rózsa Péter** skulptartisto. De la nomŝanĝo la portreto estas en la deponejo de la lernejo. >> KIL R/XIX.

**Orosháza**, str. Bajcsy-Zsilinszky, antaŭ la Evangelia Baz- kaj Mezlernejo (je inaŭguro de la ornamputo Bazlernejo Kulich Gyula) [ornamputo Kulich Gyula](#) el kalko. 1972. **Nagy István** finpretigis ĝin en 1971. La put-parto 70 cm, la kolono 240x75 cm. Teksto: **VOLTAK, AKIK FOGUKAT / CSIKORGATVA ROHANTAK / A TŪZBEN, S HARCOLTAK / CSAK AZÉRT MERT ELLE / NE MIT SE TEHETEK / VOLT, AHOVÁ LEPECSÉ / TELT MARHAKOCSIBAN / UTAZTAK, DERMEDTEN / S FEGYVERTELEN ÁLLTAK / AZ AKNAMEZŐKÖN, / S VOLT AHOVÁ ÖNKÉNT / MENTEK, FEGYVERREL / A KÉZBEN, NÉMÁN, MERT / TUDTÁK, AZ A HARC AZ / AZ Ő ÜGYŪK OTT LENN, / S MOST A SZABADSÁG / ANGYALA ŐRZI NAGY / ÁLMUK AZ ÉJBEN / RADNÓTI MIKLÓS** (Ekzistis kiuj dentgrincadante kuregis en la fajro kaj batalis nur tial ĉar nenion ili povis fari kontraŭ ĝi, estis kien ili veturis en sigelfermitaj brutvagonoj, senpoviĝante kaj senarmilie ili staris sur minkampoj, kaj estis kien ili memvole iris kun armilo en la mano, silente, ĉar ili sciis ke la batalo tie malsupre estas ilia afero, kaj nun anĝelo de libereco gardas ilian sonĝon en la nokto. Miklós Radnóti.) ♡ ♡

**Lajos Gyula** (1877-1955) romkatolika pastro, kanoniko, plebano, gvidanto de kantlernejo, gvidanto de la esperantista grupo en Pécs.

**Pécs**, Esperanto-parko, en la str. Papnövelde. Sur la komuna [memortabulo](#) de la eminentaj esperantistoj en Pécs. La tekston vidu sub la ĉapitro Esperanto-parko. Dum la inaŭguro 2010-05-24 salutparolis Imre Szabó, Prezidanto de HEA.

**LANGLET, Valdemar** (1872-1960) kiel sveda ĵurnalisto ĉirkaŭ la jarcentŝanĝo vizitadis la unuajn esperantistojn en Rusio, poste en somero de 1902 en Hungario. Prezidanto de Sveda Esperantista Societo (1906-1909). Sveda lektoro de universitato en Budapest (1932-1944), ofta vizitanto de Esperanto-aranĝoj en Budapest. Kune kun sia esperantista edzino Nina (1896-1988) inter majo 1944 kaj januaro 1945 sub egido de la Sveda Ruĝa Kruco iniciatis,

establis kaj funkciigis la hungarian hom-savantan reton, kiu per eldono de multmil „protektodokumentojn” kaj per establo de „protektataj domoj” savis la vivon de la plej multaj persekutitoj. Pere de lia longtempa ligo al la sveda reĝa familio li sukcese kontribuis al tiuj klopodoj, kiuj haltigis la deportadon de judoj al koncentrejoj. En la ruinigita Budapeŝto en 1945 li organizis la nutraĵ- kaj medikament-provizadon.

**Budapeŝto IV.** (Újpeŝto) str. Langlet Valdemar nr. 3-5. **Memortabulo. 1986.** Teksto: [Langlet Valdemar 1872-1960 a Sved Vöröskereszt főmegbizottja. 1944-ben harcolt a fasizmus ellen, segítette az üldözötteket, támogatta a rászorulókat. Emlékére állította Budapest Főváros Tanácsa 1986.](#) (Walemar Langlet 1872-1960 ĉefkomisiito de la Sveda Ruĝa Kruco. En 1944 li batalis kontraŭ la faŝismo, helpis la persekutitojn kaj tiujn, kiuj necesbezonis helpon. Je lia memoro starigis la Konsilantaro de Ĉefurbo Budapeŝto. 1986.)

**Lengyel Pál** (1868-1932) presisto. En la urbo Szekszárd li presis (1900-1904) kaj eldonis (1901-1904) la revuon *Lingvo Internacia*. Tiutempe ĝi estis la plej grava revuo de la interancia Esperanto-movado. Poste li eldonis ĝin en Parizo (1905-1914), kie li membriĝis en Akademio de Esperanto (1910-1928). Hejmenveninte el la dummilita koncentrejigo lei estis komitatano (1920-1924) poste honora prezidanto (1924-1932) de Hungarlanda Esperanto-Societo.

**Pécs.** Esperanto-parko, en la str. Papnövelde. **Memortabulo.** Teksto: [LENGYEL PÁL / 1868-1932 / a Lingvo Internacia c. nemzetközi folyóirat / kiadója és szerkesztője / eldoninto kaj redaktinto de la internacia revuo / „Lingvo Internacia” / MESZ – EKF Pécs 2010 – DURA INAŬGUROTA en 2010. G. Nagy Róbert.](#)

**Szék**

**Szekszárd.** str. Babits Mihály nr 16/a., sur la muro de lia iama presejo, laŭ iniciato de Mihály Szilágyi starigita **memortabulo. 1986-10-06.** En la teksto estas diversaj litergrandecoj: [EBBEN A HÁZBAN MŰKÖDÖTT / LENGYEL PÁL NYOMDÁJA, / A HŰL A "LINGVO INTERNACIA" / ESZPERANTÓ NYELVŰ LAPOT / ADTA KI 1901-1904 KÖZÖTT / EN ÉI-TIU DOMO FUNKCIIS LA PRESEJO / DE PAŬLO LENGYEL, KIE / LI ELDONIS LA ESPERANTLINGVAN / GAZETON "LINGVO INTERNACIA" / INTER 1901-1904 / ÁLLÍTOTTA / A SZEKSZÁRDI VÁROSI TANÁCS / ÉS A / "LENGYEL PÁL" / ESZPERANTISTA CSOPORT 1986-BAN.](#) La nomo de la urbo ĝis 1903 estis Szegszárd, tial estas ofte konfuzo je la ĝusta urbonomo. >> Szilágyi Mihály: Lengyel Pál eszperantista nyomdász, újságíró, akadémikus. = Paŭlo Lengyel, esperantista presisto, ĵurnalisto, akademiano. Szekszárd, 1988. p. 86. Fotók: az emléktábla és az avató ünnepség. - 9 Röllinger:57.

**Mihalik József, hernádszurdoki** (1883-1959) instruisto en porinstruista instituto. Fondinto kaj afergvida prezidanto de Hungara esperanto-Asocio („Federacio”, 1935-1944) servanta la irentan, t. e. teritorion (re)postulantan propagandon de la ŝtato, kaj redaktoro de *Hungara Heroldo*. Riskante sian vivon li savis persekutitajn esperantistojn en 1943-1944-ben.

**Budapeŝto XVI.** (Sashalom), Promenejo Sashalmi nr. 44., sur ĝia frontono palsta **memortabulo** en formato A/4. Envere sur la 160 kvadratmetra angulgrundo de plurfoje nomŝaĝita strato (Bejczy Jenő 1941 Révész 1945 Stromfeld Aurél 1954 Vörösmajor) nr. 1. estis la loĝdomo de Mihalik kun etaĝo kaj granda ĝardeno. Duonon de la grundo li vendis tiel, ke lia domo iĝis la str. Vörösmajor nr. 1/b. (9 Rátkai Árpád), kaj el la alia duono la str. Vörösmajor nr. 1/a. angulgrundo, kaj tiu samtempe iĝis la promenejo Sashalmi nr. 44. Post la morto de Mihalik konstruiĝis senkaraktera loĝdomo sur la grundo nr. 1/b., sur kies frontono al la promenejo Sashalmi oni metis la memortabulon. Ĝia teksto kun verdaj literoj: [Itt lakott / Hernádszurdoki Mihalik József / 1888-1959 / cinkotai tanár, / a Pedagógus Eszperantó Egyesület elnöke / a Hungara Heroldo szerkesztője. / XVI. Kerületi Közművelődési tanács –](#)



(Tie loĝis József Mihalik hernádszurdoki, 1888-1959, instruisto en Cinkota, prezidanto de Pedagoĝa Esperanto-Societo, redaktoro de Hungara Heroldo. Kultúra Konsilio de la distrikto XVI.) – „Hernádszurdoki” estis nobela antaŭnomo, oficiale uzita ĝis 1947, skribenda minuskle. – Mihalik en 1920-ban laboris en Cinkota, sed loĝis tiam en Rákosfalva, kaj en 1929 de tie tarnasloĝiĝis al Sashalomra. – La setlejoj Sashalom, Cinkota kaj Rákosfalva en 1950-ben iĝis partoj de la distrikto XVI. De Budapeŝto XVI. – La societnomo ĝuste: Hungara Esperanta Pedagoĝa Societo. – Pri la memortabulo ankoraŭ: Csizsár 13-14) ♪ Rátkai Árpád

**NEMES Antal** (1855-1941) Papa prelato, titolita episkopo, dum 38 jaroj parokestro de la Ĉeftemplo por Kronado (Matias-preĝejo), esperantistiĝis dum teologiaj studoj en Vieno, prezidanto (1924-1925), poste honora membro (de 1929) de Hungarlanda Esperanto-Societo, honorcivitano de Drégelypalánk.

**Drégelypalánk**, tombejo, **tombmonumento**.

**NEZVÁL Ferenc dr.** (1909-1987) ledlaboristo, poste komunista politikisto kun gravaj funkcioj, deputito, justicministro (1957-1966). Kiel junlaboristo lernis Esperanton. Prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio 1977-1986.

**Budapeŝto VIII.** (Józsefváros), Kerepesi úti temető, 12-3-10. **Tombmonumento**.

**PALKÓ Sándor** (1911-2001) presisto, ĉefdirektoro de Pénzjegynyomda (presejo de bankbiletoj), prezidanto de Konsilantaro de Departemento Baranya, deputito, „patro de la lago-sistemo de Orfű”. Sekretario (1929-1931) kaj kasisto (1932-33) de la grupo III. (Kispest) de Hungaria Esperantista Societo Laborista, prezidanto de Hungarlanda Esperantista societo (1949-1950) pŝntárosa a Magyar Országos. Eszperantó Egyesület elnöke (1949-1950).

**Orfű**, str. Ladik köz nr. 2., grundo de MOHOSZ sur monteto inter la lagoj de Pécsi kaj Herman Ottó. **2004-10-09**. Bronza **busto** rigardanta al la lago Pécsi. **Trischler Ferenc** skulptartisto. Inaŭguris Katalin Szili, prezidanto de la Parlamento, parolis Ervin Mitzki, prezidanto de Ligo de Fiŝkaptistaj Societoj de Baranya. Sur la postamento: **PALKÓ SÁNDOR / 1911-2001** ♪ ifj. Palkó Sándor

**Orfű**, tombejo Orfű-Mecsekrákosi. **Tombo**.

**PALLÓS Istvánné** (1822-1995) gvidanto de la E-movado en la departemento Baranya. Estrarano de Internacia Asocio Monda Turismo.

**Pécs**, Esperanto-parko, en la str. Papnövelde. Sur la komuna **memortabulo** de la eminentaj esperantistoj en Pécs. Dum la inaŭguro 2010-05-24 salutparolis Imre Szabó, Prezidanto de HEA. **G. Nagy Róbert**. La tekston vidu sub la ĉapitro Esperanto-parko.

**PÁZMÁNY Zoltán, szőlősi, szilasi és laki** (1869-1948) universitata profesoro la romia juro (Pozsony, Budapeŝto, Pécs), prezidanta konsilisto de Hungara Eksterlanda Konsilio, prezidanto (1924-1928) kaj honora prezidanto (1928-1948) de Hungarlanda Esperantista Societo.

**Brestovec / Szilas SK**, ul Hlavná 83. **Memortabulo**. 1996.

**Brestovec / Szilas SK**, tombejo, **kripto** de Pázmány-familio.

**PECHAN Alfonz** (1902-1994) instruisto en Pécs, redaktis la vortarojn H-E, E-H kaj Gvidlibro por supera ekzameno. En Hungario organizanto de E-ekzamenoj dum 40 jaroj. Prezidanto de Hungara Esperanta Pedagoĝa Societo (1939-1944). Estrarano kaj honora membro (de 1985) de Hungaria Esperanto-Societo.

**Budapeŝto XII.**, Tombejo Farkasréti temető, parceloj novaj 15. vico 10. nr. 10. **Tombŝtono**



**Pécs**, Esperanto-parko, en la str. Papnövelde. Sur la komuna **memortabulo** de la eminentaj esperantistoj en Pécs. Dum la inaŭguro 2010-05-24 salutparolis Imre Szabó, Prezidanto de HEA. La tekston vidu sub la ĉapitro Esperanto-parko.

**PRINCZ Oszkár** (1947-2004) bibliotekisto-popolklerigisto, de 1965 esperantisto, de 1984 aperis liaj lernolibro kaj aliaj lerniloj de E., de 1982 oficisto, sekretario (1986-1998) kaj ĉefsekretario (1998-2004) de Hungaria Esperanto-Asocio.

**Budakalász**, Tombejo Szent István telepi. **Tombŝtono**. Surskriboj antaŭe: **PRINCZ OSZKÁR / 1947-2004** dorse: **DE MORTO KAPERITA / MI VIVAS MEMORATA**

**RAJCSI Rezső** (1886-1920) laŭ la matrikulo Rajczy, en kiu la finiĝo Y aludas al la nobela deveno, sed li konsekvence uzis la nomon Rajczy. Juristo de la Hungaraj Ŝtatifervoj (MÁV) en Debrecen, poste de 1913 en la Direktorejo Budapest, poeto, framasonisto, kontraŭmilitisto, poste komunisto, dum la Konsilia Respubliko vicestro de Infanprotekta Sekcio de Laborafera kaj Popolbonfarta Popolkomisarejo kaj kunprezidanto de Kontraŭalkohola Konsilio, aktivisto de la vegetaria movado. Eisto de 1906, sekretario de la unua Eista grupo en Debrecen, membro de Hungara Esperantista Societo, delegito de Universala Esperanto-Asocio en Debrecen (1908-1910), fondmembro de Hungaria Esperantista Societo Laborista en 1913, honora prezidanto de Propaganda Komitato de Internacia Lingvo (1919-1920), sekretario de Internacia Vegetarana Esperantista Ligo. Liaj artikoloj kaj poemoj aperis en pluraj Esperanto-revuoj, li partoprenis universalajn kongresojn kaj renkontiĝis kun Zamenhof. En septembro 1919 dum traserĉo de lia loĝejo oni trovis Esperantaĵojn. Surbaze de tiuj suspektindaĵoj oni arestis lin, sed „kontraŭnaciaj pekoj” ne estis pruveblaj. Pro turmentoj en la arestejo li mortis la 22-an de januaro 1920.

**Budapest, VI**, (je la inaŭguro bulvardo Lenin nr. 120.) balnka marmora **memortabulo**, **1971-07-05**. Inaŭgur-parolis József Lindler, vic-ĉefdirektoro de a Hungaraj Ŝtatifervoj (MÁV). La sorto de la memortabulo estas nekonata.

**Budapest, XII**, tombejo Farkasréti 2-3-129. **Tombo**. **Debrecen** Stacidomo, **memortabulo** 1986-1990.

**ROBICSEK Pál** (1892-1931) poŝt- kaj telegram-oficiro, ĵurnalisto, en 1919 vicpopolkomisaro pri poŝtaferoj, poste direktanto de la modernigo de soveta poŝto. Redaktoro de *La Verda Standardo* (1911-1913), estrarano de Hungralanda Esperanto-Societo (1911-1919), estrarano, poste kontrolkomitatano de Sovetrespublikara Esperanto-Unio. Iniciatoro de la unuaj Esperantaj poŝtmarkeldonoj (1925-1927).

**Budapest V**, str. Városház nr. 18. (iama Ĉefpoŝtejo) en antaŭejo de la angul-enirejo ruĝmarmora † **memortabulo** 1x1,2 m. Je la disiĝo de poŝto kaj telefon-firmao on trakonstruis la enirejon. La sorto de la memortabulo estas nekonata.

**RUBINYI Mózes** (1881-1965) instruisto, lingvisto, literaturhistoriisto, afergvidanto de Hungara Pen Club. Jarcentkomence laŭ la starpunkto de la germana lignvoscienco li rifuzis la teorion pri la Internacia Lingvo. Pro la diskuto Esperanto-Ido li tamen daŭre sekvis la eventojn de la movado, eĉ teorie jam akceptis la ideon de la Internacia Lingvo. En 1928 la solvon li vidis en la lingvoprojekto Novial, sed fine li aliĝis al Esperanto. Poste li apogis la proponojn por enkonduki Esperanton kiel devigan lernobjekton en la lernejojn, kaj oni elektis lin honora membro de Hungarlanda Esperanto-Societo (1946).

**Budapest X**. (Kőbánya), str. Kozma, Juda tombejo. **Tombmonumento**.

**SCHULEK Frigyes** (1841-1919) arkitekto, universitata profesoro, honora prezidanto de Hungara Esperanto-Societo La Verda Standardo (1909-1911), poste eksesperantisto kaj prezidanto de Unio di la Linguo Internacia Ido (1914-1919).

**Balatonlelle**, str. Kossuth Lajos nr. 2., Kastelo Szalay, Kulturdomo. **Statuo**.

**Balatonlelle**, vilao Schulek, **memorputo** el marmoro kaj bronzo, 85 cm. **1989. Rétfalvi Sándor** skulptartisto. >> KIL R/XII.

**Szeged**, Dóm tér, Nacia Panteono, suda flanko de la arkadaro. **1930-06-19. Stróbl Alajos**. Inaŭguro: 1930-10-15. Naturgranda **busto** el marmoro. Surskribo: **SCHULEK FRIGYES ÉPÍTŐMŰVÉSZ 1841-1919** (arkitekto) >> Tóth:137. - Foto: *Délmagyarország* 1969-08-10. p.5. ♀ Rátkai Árpád

**SIMONYI Zsigmond** (1853-1919) lingvisto, universitata profesoro. De 1918 vicprezidanto de Propaganda Komitato de la Internacia Lingvo. En 1919 klopodegis por enkonduki Esperanton en la universitaton kaj rezulte en julio 1919 en la universitato de Budapeŝto fondiĝis Internacia Lingvoinstituto, la unua en la mondo.

**Budapest VIII.** (Józsefváros), tombejo Kerepesi 34-6-14, **ornam-tombo**.

**Veszprém**, str. Kossuth nr. 7. **Memortabulo**. **1929**. Teksto: **ITT SZÜLETETT 1853.**

**JANUÁR 1-ÉN / SIMONYI ZSIGMOND / A MAGYAR NYELV NAGY TUDÓSA / A MAGYAR NYELVŐR SZERKESZTŐJE** (1853-01-01 tie naskiĝis Zsigmond Simonyi, granda sciencisto pri la hungara lingvo, redaktoro de *Magyar Nyelvőr*.)

**STROMFELD Aurél** (1878-1927) stabkolonelo dum la unua mondmilito, poste stabestro de Ruĝa Armeo de Konsilia Respubliko. Antaŭ lia morto prezidanto de XIV. (privatoficista) grupo de Hungaria Esperanista Societo Laborista. – Stromfeld neniam estis komunisto, lian memoron ofendas en la fino de la promenejo en la tombejo „Ili batalis por la komunismo” same kiel decidoj de stultaj politikistoj por forigo de liaj memortabuloj kaj busto.

**Békéscsaba**, Kazerno. **Portreto** el kalko de Harszt. **1971. László Péter** skulptartisto. >> KIL: L/VI.

**Budapest VIII.** (Józsefváros), tombejo Kerepesi, maldekstra laborismovada tombo-promenejo, **ornamtombo**.

**Budapest XVII.** (Rákoskeresztúr, Rákoshegy) Rákoskeresztúr, vojo Pesti nr. 165., malantaŭ la urbestra oficejo, en statu-ĝardeno oni starigis bornzan **buston**. **1969. Oláh Szilveszter**. – Stromfeld estis eksterordinare populara inter la simplaj soldatoj kaj en la armeo de la monarkio, kaj en tiu de la Konsilia Respubliko, kaj lia memoro vivis tra generacioj. La avo de kreinto de tiu busto soldatservis sub la komando de Stromfeld, kaj la statuon li faris nure pro familia memoro. La statuon ĉ. 1990 on ŝtelis kune kun aliaj bronzaĵaj statuoj. Ĝian gipsan kopion gardas la kreinto en Rákoshegy.

**Pápa**, Flughaveno, komandejo. **1978-09-19. Memortabulo**. Teksto: **Stromfeld Aurél születésének 100. évfordulójára Pápa, 1978. 09. 19. MN. 5081 személyi állománya.** (Je la 100. datreveno de naskiĝo de Aurél Stromfeld. Pápa, 1978-09-19. Soldataro de MN 5081.) [http://www.ekmk.hu/emlekhely/Emlekhelyek/h\\_150109.html#109](http://www.ekmk.hu/emlekhely/Emlekhelyek/h_150109.html#109)

**Salgótarján**, Vojo Rákóczi nr. 60., en Maŝinfaka kaj Konstruindustria Fakmezlerejo. **Busto**. >> ♀ <http://www.stromfeld.sulinet.hu/v2002/indexb27f.html?r=1&sr=14>

**SZAKASITS Árpád** (1888-1965) ĵurnalisto, politikisto. Kiel junlaboristo lernis Esperanton, kiel ĉefredaktoro de la ĵurnalo *Népszava* enkondukis E-rubrikon kaj E-kurson en la unuaj militjaroj. Li estis ŝtatestro (1948-1950) sen fakta povo, eĉ oni enkarcerigis lin (1950-1956). Kiel prezidanto de ĵurnalista societo kaj Packonsilantaro de 1958 ebligis la eldonon de la hungaraj numeroj de *Paco*.

**Budapest XI.** (Újbuda), vojo Etele (iama Szakasits Árpád). **Bronza statuo** de **Marton László** skulptartisto, **1988**. Kvankam en 1991 en la diskuto pri ĝia sorto estis argumentoj, ke la statuo restu sur ĝia originala loko, tamen la distrikta aŭtonomio decidis malkonstrui ĝin en 1992 kaj starigi ĝin en Statuparkon malfermitan en 1993. >> A Fővárosi Közgyűlés Határozatainak jegyzőkönyve. 1234-1266/1991.

**Budapest XII.** (Hegyvidék), Csörsz u. 18., MOM la iama Szakasits Árpád Művelődési Központ (hodiaŭ MOM Művelődési Ház). **Bronza statuo** de **Kisfaludi Strobl Zsigmond**, **1970**. Iom poste ĝi malaperis(?!).

**Budapest, XII.**, tombejo Farkasréti 612/2-413. **Kriptoniĉo**. Originale en la tombejo Kerepesi en la ornam-promenejo laboristmovad-historia.

**Budapest XXII.** (Budatétény) Stratangulo vojo Balatoni kaj str. Szabadkai, Szoborpark (Statu-parko), Senfina promenejo de personoj de la laborista movado. **Bronza statuo** de **Marton László** skulptartisto. La originala loko de la statuo estis Budapest XI., vojo Etele (iama Szakasits Árpád), sed en **1993** oni portis ĝin en ĉi novan lokon.

**SZATHMÁRI Sándor** (1897-1974) maŝin-inĝeniero, Esperanta kaj hungara verkisto. Ĉefverko: *Vojaĝo al Kazohinio*. Vicprezidanto de Hungarlanda Esperanto-Societo (1941-1946), faka kunlaboranto de esperantaj vortaroj.

**Budapest XII.**, tombejo Farkasréti, nr. 32/1-1-angulo. Piramid-forma **tombmonumento**.

**SZALAI András** (1917-1949) (originala nomo: LÄDLER Ervin) tornistro en Pécs, poste en Budapest. En Jugoslavio li esperantistiĝis kaj lernis en Teknika Universitato de Zagreb. (1937-1939). Reveninte en Hungarion pro komunista agado oni kondamnis lin je pundo. Post la milito li laboris en la centro de Hungara Komunista Partio. En la prekoncepta proceso kontraŭ László Rajk ankaŭ lin oni mortkondamnis kaj ekzekutis.

**Budapest VIII.** (Józsefváros), tombejo Kerepesi, maldekstra laborismovada tombo-promenejo, **ornamtombo**.

**Pécs**, vojo Nagy Lajos király (je starigo de la memortabulo str. Szalai András u.) nr. 15. **1967**. **Memortabulo** el blanka marmoro. Surskribo: SZALAI ANDRÁS / 1917-1949 / A MAGYAR MUNKÁSMOZGALOM / TEVÉKENY ALAKJA, / IFJÚ KORÁBAN E GYÁR MUNKÁSA VOLT, / RÉSZT VETT PÉCS VÁROS / MUNKÁSMOZGALMÁBAN. / HŰSÉGES, FÁRADHATATLAN / SZOLGÁJA VOLT A NÉPNEK: / ÚGY ÉLT, AHOGYAN IGAZ EMBERNEK / ÉLNIE KELL... / 1967 (Szalai András, 1917-1949, agema figuro de la hungara laborista movado, en sia junaĝo li estis laboristo de tiu fabriko, partoprenis la laboristan movadon de Pécs, li estis fidela, senlaca servanto de sia popolo, vivis tiel kiel devas vivi ĉiu envera homo... 1967) >> Romváry:417, ♀ Halász Rudolf

**SZÉCHENYI István, grafo** (1791-1860) En la jaro 1842 tiu grafo en sia akademia parolado menciis la ideon de universala lingvo. En 1929 tion oni false asertis, ke li pledis por la Internacia Lingvo, ĉar oni ne distingis je la nocioj *universala* kaj *internacia*. La memortabulo do ne je István Széchenyi, sed je tiu eraro memorigas nin.

**Budapest XIV.** (Zugló), sur la muro de Trafika Muzeo **emléktábla**. Originale oni intencis meti ĝin sur la muron de la akademio MTA, sed tiu instucio malkonsentis tion. Tial oni metis ĝin sur la muron de placo *Vigadó tér* nr. 1. kaj la partoprenantoj de 21. Universala Kongreso de Esperanto inaŭguris ĝin **1929-08-04**. Dum la sieĝo de Budapest en 1945 tiun domon oni pafadis ĝis kompleta ruiniĝo, kaj la tabulo neniigis. Por starigi ĝin en la kastelo de Széchenyi-familio en Nagycenk Hungaria Sekcio de Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj preparis ĝian kopion. Sed tiu plano ne realiĝis, kaj la kopion oni inaŭguris ĉi-loke **1989-04-02**. – Szövege három (bal, jobb és alsó) mezőben: [bal mezőben:] **A XXI. / EGYETEMES ESZPERANTÓ KONGRESSZUS / GRÓF SZÉCHENYI ISTVÁN / EMLÉKÉNEK /**

NEMZETKÖZI HÓDOLAT A LEGNAGYOBB MAGYARNAK / AKI 1842 NOVEMBER 27-ÉN A MAGYAR TUDOMÁNYOS AKADÉMIA / ÜLÉSÉN NEMZETKÖZI NYELV SZERKESZTÉSÉÉRT EMELT SZÓT. [dekstra kampo:] LA XXI-A / UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO / AL LA MEMORO DE / GRAFO STEFANO SZÉCHENYI / INTERNACIAN HONORESPRIMON AL LA „PLEJ GRANDA / HUNGARO” KIU PLEDIS POR KOMPILADO DE INTERNACIA / LINGVO EN LA HUNGARA SCIENCA AKADEMIO LA 27 NOVEMBRO 1842 [meza kampo:] BUDAPEST 1929 AUGUSZTUS 2-9. / AZ EREDETI EMLÉKTÁBLÁT A VIGADÓ ÉPÜLETÉBEN LEPLEZTÉK LE. [sur la foto la cetera teksto estas kovrate] >> *Hungara Heroldo*. 1929-09-12. B. eld. Nr. 4. p. 10. – *Budapeŝta Informilo*. 1989. jul-aŭg. p. 1-2. – Csiszár: 11-12.

**SZERDAHELYI István dr.** (1924-1987) instruisto pri la rusa lingvo, universitata docento. Eisto de 1949. Budapeŝta universitato ELTE: gvidanto de la fako Esperantaj lingvo kaj literaturo, kiun li fondis en 1966. Li ellaboris la bazajn dokumentojn kaj lernolibrojn de tiu fako. Akademio de Esperanto: membro de 1986. UEA: honora membro de 1983, ILEI: prezidanto de 1985, Hungara Esperanto-Asocio: vicprezidanto de 1986.

**Balatonalmádi.** Tombejo Vörösberény. **Tombmonumento.**  
**Pécs.** Esperanto-parko, en la str. Papnövelde. **Memortabulo.** Teksto: SZERDAHELYI ISTVÁN / 1924-1987 / pedagógus, nyelvész, az esperantó szakos / egyetemi képzés megszervezője / pedagogo, lingvisto, universitata / Esperanto-kapablígo / MESZ – EKF Pécs 2010 – DURA Dum la inaŭguro 2010-05-24 salutparolis Imre Szabó, Prezidanto de HEA. **G. Nagy Róbert.**

**TAKÁCS József dr.** (1890-1944) kuracisto, Eisto de 1908, delegito ekde 1923, poste hungaria ĉefdelegito de UEA. Inter 1911 kaj 1941 ĉiam havis gravan postenon en Hungarlanda Esperanto-Societo, plurfoje ĉefsekretario, sed retiriĝis pro la kontraŭjudaj leĝoj. Li kreis Hungarlandan Esperanto-Muzeon, kiun la instancoj konfiskis kiel judan havaĵon, poste ĝi malaperis. Tagon post la puĉo de sagokruculoj kune kun aliaj 216 kuracistoj kaj inĝenieroj oni maŝinpafade murdis ilin en la fosajon farigitan de ili mem. La 26-an de de majo 1946 HES elektis lin porĉiama honora prezidanto.

**Budapest X.** (Kőbánya), str. Kozma, juda tombejo. A Pusztavámnál 1944-ban meggyilkolt és onnan 1947. április 13-án ide áttemetett 216 orvos és mérnök **Tombmonumento** de ĉi tien reentombigitaj 216 kuracistoj kaj inĝenieroj, kiujn oni murdis ĉe Pusztavám en 1944. ☞ Karsai p. [A pusztavámi mártírok emlékműve.]

**Nagyváros.** Str. Magyar nr. 26., sur lia iama, konfiskita loĝdomo **memortabulo**. 1983. Teksto: DR. TAKÁCS JÓZSEF / 1900-1944 / A MAGYAR ESZPERANTÓ EGYESÜLET / EGYKORI FŐTITKÁRA A FASIZMUS ÁLDOZATA / EMLÉKÉRE. / MEMORE AL LA IAMA ĈEFSEKRETARIO / DE HUNGARA ESPERANTO-SOCIETO / VIKTIMO DE FAŝISMO / 1983.05.06. / PEST DEPARTEMENTA KOMITATO DE HUNGARA ESPERANTO-ASOCIO PATRIOTA POPOLFRONTO ☞ Radnai

**Pusztavám.** **Memortabulo** pri 216 kuracistoj kaj inĝenieroj murditaj ĉe la monto Szőkehegy en 1944. Iliajn restaĵojn oni reenterigis en 1946 al la tembejo en str. Kozma, Budapest.

**TOLNAI Pálné Göndör Rózsi** (-1944) privatoficistino, en sia infanaĝo lernis Esperanton en Hungaria Esperantista Societo Laborista. Ĉefkunlaboranto de *Hungara Heroldo*, verkis artikolojn, tradukis novelojn. Komitatano de Hungarlanda Esperantista Societo (1928-1941), kontrolkomitatano (1943-1944) kaj en 1946 postmorte elektita porĉiama honora membro.

**Budapest X.** (Kőbánya), str. Kozma, juda tombejo, parcelo A., vico 7., nr. 5-38.

**Tombmonumento** de 344 virinoj tien ĉi reentombigitaj 1946-05-05, el la amastombo de la



koncentrejo Lichtenwörth (AT). Registronumero de la nomaro: 751/1946. ☞ Takács p. [A lichtenwörthi mártírok emlékműve.]

**TORMA Sándor** (1910-1981). Fervoĵisto, deklamisto de multaj Esperanto-aranĝoj. **Fécel**. Kalvinana tombejo. Betona **tombŝtono** kun iam verda stelo. Surskribo: **RIPOZU KUN PACO / PACON POR LA HOMARO / ESPERANTO ETERNE / VIVOS / A. TORMA / F. HOSPITALO** Solvo de la mallongigoj: Alexandro Torma, Fervoĵista Hospitalo.

**UNGÁR Imre** (1909-1972) blinda pianartisto, profesoro de Muzikarta Altlernejo kun premio Kossuth (1949) kaj premio Liszt (1962). Kiel entuziasma esperantisto partoprenis la gravajn Esperanto-aranĝojn kaj ludis muzikverkojn de Bach, Beethoven kaj Chopin. **Budapest XII.**, tombejo Farkasréti 27-3-55, **urnotombo**.

**VÁNDOR (pli frue: VENETIANER) Sándor** (1901-1945). Dirigento, komponisto, organizanto de korusmovado. Esperantisto ekde sia infanaĝo.

**Budapest VII.** vojo Dózsa György nr. 68. Ruĝmarmora **memortabulo kun reliefo**. 108x173 cm. 1966. **Farkas Aladár** skulptartisto. >> ☞ Hadházy Levente 95

**Budapest VIII.** (Józsefváros), tombejo Kerepesi nr. 24-1-75, **tombmonumento 1960**. **Farkas Aladár** skulptartisto. Teksto sur la reliefo: [violonkleo] „S ÉLTE HA VAN ÉLTE MÉG EGY / A PROLETÁR UTÓKORÉ” („kaj lia vivo se estas ankoraŭ unu/ tiu de la proleta postepoko”), sur la tombkovrilo **VÁNDOR SÁNDOR / 1901-1945**

☞ [http://www.agt.bme.hu/staff\\_h/varga/foto/kerepesi/vandor.html](http://www.agt.bme.hu/staff_h/varga/foto/kerepesi/vandor.html)

**Tiszaújváros**, str. Hámán Kató nr. 5. Terakta **busto**. 1985. **Farkas Aladár** skulptartisto.

**VASADY-KOVÁCS Ferenc** (1904-1977) ŝtatsekretario de la Financministerio, prezidanto de Hungarlanda Esperanto-Societo (1947-1948).

**Budapest XII.** (Farkasrét), tombejo Farkasréti 6/1-1-56, **tombmonumento**.

**VEIGELSBERG Hugó alinome IGNOTUS** (1869-1949) ĵurnalisto, kritikisto, verkisto.

Ĉefredaktoro de la literatura revuo *Nyugat*. Diference de aliaj ĵurnalistoj li unue ellernis Esperanton kaj nur poste verkis pri ĝi en 1905 kaj 1911.

**Budapest VIII.** (Józsefváros), tombejo Kerepesi 24/1-2-72. **Tombmonumento** István **MARTOS**. Surskribo: **IGNOTUS / KÖLTŐ KRITIKUS / A NYUGAT FŐSZERKESZTŐJE** (Ignotus / poeto kritikisto / ĉefredaktoro de *Nyugat*).

[http://hu.wikipedia.org/wiki/F%C3%A1jl:Ignotus\\_s%C3%ADrja.jpg](http://hu.wikipedia.org/wiki/F%C3%A1jl:Ignotus_s%C3%ADrja.jpg)

**Budapest XII.** Szilágyi Erzsébet fasor 10. (hátsó front, Városmajori u., Ignotus u.) **Memortabulo**. **IGNOTUS / 1869-1949 / KÖLTŐ, ÍRÓ, KRITIKUS. A NYUGAT / FŐSZERKESZTŐJE. AZ ÍRÓI SZABADSÁG, / A VÁROSI IRODALOM, A MODERN KÖLTÉSZET / KIVÁLÓ HARCOSA / BUDAPEST FŐVÁROS TANÁCSA / 1969** (Ignotus /1869-1949 / poeto, verkisto kritikisto. De *Nyugat* / ĉefredaktoro. De la verkista libereco / la urbana literaturo, la moderna poezio / elstara batalanto / Konsilantaro de Ĉefurbo Budapeŝto /1969)

[http://upload.wikimedia.org/wikipedia/hu/8/86/Ignotus\\_eml%C3%A9kt%C3%A1bl%C3%A1ja\\_Szil%C3%A1gyi\\_Erzs%C3%A9bet\\_fasor\\_10\\_h%C3%A1ts%C3%B3\\_front.JPG](http://upload.wikimedia.org/wikipedia/hu/8/86/Ignotus_eml%C3%A9kt%C3%A1bl%C3%A1ja_Szil%C3%A1gyi_Erzs%C3%A9bet_fasor_10_h%C3%A1ts%C3%B3_front.JPG)

**VIKÁR Béla** (1859-1945) Etnografo, arttradukisto, koresponda membro de Hungara Scienca Akademio. Ekde la 1910-aj jaroj esperantisto, komitatano (1920-1928), poste honora membro (1928-1945) de Hungarlanda Esperanto-Societo.

**Balatonboglár**, Kulturdomo. Bronza **portretreliefo** 55 cm. 1959. **Vasas Károly** skulptartisto. >> KIL: V/XVIII.



**Budapest XII.** (Farkasrét), tombejo Farkasréti nr. 6/1-1-56, [tombmonumento](#).

**Dunavecse**, Kulturdomo. [Portretreliefo](#) el bronzok aj ŝtono. 103x70 cm. **1984**. Vikár kiel maljunulo kubutumanta en fenestro kaj elrigardanta malproksimen. **Eskulits Tamás** skulptartisto. >> KIL: E/6.

**Hetes**, Vilaĝdomo. [Memortabulo](#), **1959**. Teksto: **A község nagy szülötte, Vikár Béla néprajztudós emlékére. Született 1859. ápr. 1-én. Halála 10. Évfordulóján kegyelettel emlékezik meg róla Hetes község népe. 1955. Szept. 22.** (Je la memoro de la granda etnografo Béla Vikár, kiu naskiĝis 1859-04-01 Je la deka datreveno de lia morto piece memoras lin la popolo de la vilaĝo.)

**Pécs**, str. Mátyás király nr. 15. Muzikarta Altlernejo. **1965**. [Mmortabulo](#) el blanka marmoro. Teksto: „Szedtem száz számra igéket, / ezrivel bűvös beszédet, / fölfejtettem igék titkát, / regék rejtekének nyitját.” / Kalevala 17:617-620 / **EBBEN AZ ÉPÜLETBEN / - A VOLT FÖREÁLISKOLÁBAN - / DIÁKOSKODOTT 1871-1877-BEN / VIKÁR BÉLA / (1859-1945) / FOLKLÓRKUTATÓ, / A MAGYAR NÉPDALKUTATÁS ÚTTÖRŐJE, / KALEVALA FORDÍTÓ. / MÚZEUMI HÓNAP 1965.** (Mi kolektis centojn da verboj, milojn da sorĉparolojn, solvis sekreton de verboj, trovis solvon de legendoj.” – Kalevala 17:617-620. En tiu domo, en la iama ĉefreallernejo studis en 1871-1877 Béla Vikár 1859-1945, folkloristo, pioniro de esplorado de la hungaraj popolkantoj, tradukinto de Kalevala. Monato de la muzeoj 1965.) >> Romváry:398 ♡ Halász Rudolf

**ZACHÁR Géza** (?-1944) teknika laboristo de Nacia Teatro, socialdemokrata partiano. Notario (1928-1929), poste vicprezidanto (1929-1931) de Hungaria Esperantista Societo Laborista, komitatano (1938-1942) de Laborista Sekcio de Hungara Esperanto-Federacio. Partoprenanto de la rezistmovado kaj vivsavanto de judoj en 1944. A sagkruculoj kaptis kaj mortpafis lin. 2003: Justulo de la Mondo.

**Budapest VII.**, Aleo Városligeti (Gorkijs tiutempe), en la vestiblo de la iamam sidejo de MÉMOSZ (konstrulaborista sindikato) [memortabulo](#). Kun la nomoj de rezistantoj konstrulaboristaj. Tiun domon oni tute malkonstruis, sorto de la memortabulo estas nekonata.

**ZAMENHOF, Lazar Markovič, dr.** (1859-1917) kuracisto, rusa judo naskiĝinta en la urbo Bjelostok (Grodnoa gubernio, Rusio), kreinto de la lingvoprojekto Internacia Lingvo, iniciatinto de tiu lingvo kaj ĝia movado. Li havis plurdek plumnomojn. Lian identecon oni ofte falsofaras tiel, ke la vortojn *Markovič, internacia, juda, rusa, iniciato* kaj *Internacia Lingvo* oni anstataŭigas per iu alia vorto, kaj tiel „senriproĉigas” Zamenhofon ankaŭ por diversaj naciistoj, rusofoboj kaj antisemitoj. Tion servas la ofte kompletaj misinformoj, ekzemple tiel: „*la pola Ludwik Zamenhof naskiĝinta en la pola urbo Bjalystok kreis la artefaritan lingvon Esperanto*”.

**Budapest I** (Tabán), str. Hadnagy, antaŭ la banejo Rác, en Buda ĉe abutmento de Erzsébet-ponto. La postamenton en **1987** starigis Mária Sarkadi florvendej-posedanto. Surskribo: **DR. L. L. / ZAMENHOF / AZ / ESZPERANTÓ NYELV / MEGALKOTÓJA.** Dr. L. L. Zamenhof kreinto de la lingvo Esperanto.) – Ĝuste devus esti: L. M. Zamenhof, iniciatinto de la Lingvo Interancia.) La bronzan [statuon](#) kreis **Tamás Gyenes** kaj en la nomo de HEA transprenis dum la Zamenhof-festo **1959-12-15** transprenis ĝin Kálmán Kalocsay, prezidanto de la Klubo Konkordo, kaj iam poste oni metis ĝin sur la postamenton. En 1996 (1994?) oni ŝtelis la statuon, verŝajne oni ĝenis la deliktulon dum tio, kaj oni trovis la statuon ne malproksime. Oni re-inaŭguris ĝin en **1996**. Oni refoje ŝtelis ĝin en 1998, verŝajne pro la plivaloriĝo de la metalo, kaj poste oni ne sukcesis trovi ĝin. – En la jaro 1998-1999 Tamás kaj Edit Slezák financis [novan buston](#) el kalko, kiun skulptis **Péter Berecz**. La gipsa originalo estas en la oficejo de Kultura Esperanto-Asocio en Budapeŝto. Je la inaŭguro **1999-08-12** el la

urbo Veszprém veturis al Budapeŝto la partoprenantaro de Internacia Junulara Kongreso de TEJO. – En la marto de 2008 tiun statuon nekonatuloj faligis, sed iuj ĝin trovis nemalproksime kaj portis al la Polickapitanejo de la distrikto I., de kiu transprenis la Galerio Budapest. – En **2010** oni restarigis la statuon en sian lokon, kie oni rekonstruis la tutan parkon kaj la ĉirkaŭaĵon. >> *Várnegyed*. 1996-10-18. ♪ Népszabadság 2005-07-09. p. 16.

**Budapest VI.** (Terézváros), vojo Andrásy nr. 27., ejo de HEA. Je la ĉeso de la ej-luo la busto estis forigita al nakonata loko. Gipsa kopio de **busto** en la VIII. distrikto.

**Budapest VIII.** (Józsefváros), bvd. Múzeum nr. 4. domo D. teretaĝo, biblioteko de la Katedro pri Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko de ELTE. **1997-12-15.** **Busto.** **Harcza Boglárka** kreis laŭ la mendo de Károlyné KÖDMÖN, inaŭgurita dum la Zamenhof-festo. Ĝia originala loko estis en la str. Papnövelde nr. 1. etaĝo 2., koridoro. De tie oni transloĝigis ĝin en 2000 kune kun la Katedro al la bulvaro Múzeum.

